


# PONTO ☆

*Jaro 4 N-ro 1 (22) Organo de Sunda Esperanto Agado febr. 2005*

## La 8-a SEA kunveno okazos en Lund la 12an de marto je la 11-a h.

Bonvenon al Lund kaj Krafts Torg 12A (SENSUS) je la 11-a h, samloke kiel antaŭ du jaroj. Pro novuloj: la domo estas malantaŭ la katedralo. Veninte de la stacidomo iru iom dekstren al Bantorget, sekvu Klostergatan ĝis kiam vi vidas la katedralon.
Je proksimume la 12-a h ni ofertas lunĉon kaj je la 15-a h kafon/teon. Kosto: 60 SEK.
Anna-Maria Lange, LEK

Tagordo:
1. Raportoj pri la pasinta periodo
2. Ponto, paĝarانĝo, programpaĝo
3. Kursoj
4. 100-jara jubileo
5. Informlaboro- interne kaj ekstere
6. Eventuale
7. Venonta kunveno

Anoncu vin al Anna-Maria tel. 046-147309 aŭ al Karin tel. 040-980120, mail karin-lindquist@telia.com

**Ur "@just nu"**
**Några användbara internetsajter:**
www.esperanto.se: SEF:s sidor
www.esperanto.net: Referenssajt med länkar till informationssidor på många olika språk
www.2-2.se En rik samling argument om esperanto, med data om språksituationen i världen. På 15 olika språk
www.uea.org: UEA:s officiella sidor, med aktuell information, bokkatalog, anmälningsblanketter m.m
www.lernu,net: En utmärkt sajt för den som vill lära sig esperanto. Även den här på många olika språk
gxangalo.com: Allmänna nyheter på esperanto

## LA JARKONGRESO DE SEF 2005

okazos en Haninge ((20 minuta vojaĝodistanco de Stokholmo) **la 20-an ĝis la 22-a de majo**.
**Favora prezo de aliĝkotizo kaj manĝoj: 545 kr. Pagu al postĝiro 82 26 64-9, Esperantoföreningen Södertörn**.
Tranoktejon ĉiu devas mem aranĝi, kaj estas bone fari tion frue. Demando ĉe Esperanto-Centro.
Proponoj por la jarkunsido de SEF devas atingi la estraron antaŭ la fino de februaro (adreso Esperanto-Centro, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00.

## DANA JARKUNVENO

***9-10-an de aprilo* en Tune Agrikultura lernejo/Tune Landboskole, Grevevej 20, Greve.**

Programo: ***Sabaton:*** 13.00 Alveno kaj enloĝigo. 14.00 ***Sproglige menneskerettigheder og draebersprog*** (dr. Phil. Tove Skutnabb-Kangas) en la sveda lingvo. 15.35 *Kia lingva politiko por Eŭropo kaj kiu strategio por la esperantistoj en la Eŭropa Unio?* (Michael Cwik). 17.00 *Lingvo kaj komputiloj* (Eckhard Bick). 18.30 *Festmanĝado.* Trinkaĵoj aĉeteblas. 20.00 *Distra vespero. –* ***Dimanĉon:*** 09.00 *ĝeneralkunveno de DEA.* 09.00 *ĝeneralkunveno de DEJO.* 11.00 *ĝeneralkunveno de DEFA.* 12.00 *Lunĉo.* – Prezoj: Kotizo: 80 kr. Manĝoj kaj 1-lita ĉambro: 750 kr. Nur manĝoj, sen tranokto 375 kr. Vegetarano, indiku!

**Mendu antaŭ la 8-a de marto 2005 al Ina Schultz, Bredagervej 21, 3.th., DK-2770 Kastrup. Tlf.: 0045 3252 1958, retadreso:** ina.schultz@get2net.dk
Praktikaj informoj: La aŭtobusa linio 600S (Hilleroed-Hundige St.) haltas je la agrikultura lernejo. Prenu la aŭtobuson je la stacidomo de Roskilde aŭ de Greve. Daŭras proks. 15-20 min. DEA aparte bonvenigas gastojn el niaj najbaraj landoj.

Nästa **Ponto**, nr 2
utkommer ca 22/4
Skicka allt material till
*Karin Lindquist*
senast den 9.4

*Sunda Esperanto Agado*
Reto de la Esperanta kunlaboro en la Sunda regiono

Redaktionskommitté/*redakta komitato:*
**Kontaktperson:** *Karin Lindquist* *karin@agado.net*
Sergels väg 14A, SE-217 57 Malmö +46 40 98 01 20
Övriga/kromaj anoj: Sten Svenonius (paĝaranĝo), Johan Svenonius (tekniko), Per-Olov Johansson (presado), Gertrud Lund.


ISSN 0907-127X

# La Folio

Klubo Esperantista de Malmö

*Jaro 76 N-ro 1 (690)* >>Ĉiam antaŭen<< Fondita en 1906


## Jubilea kongreso - raporto 2

La laboro por la jubilea kongreso 2006 progresas. Pasintnumere ni informis pri kongresa ejo – Kvarnby Popolaltlernejo.

Ĉar la kongresaj taskoj estas multaj – jubilea historiko, esplori hotelĉambrojn, manĝaĵoj, havigi prelegonto(j)n, aranĝi ekskursojn, ekonomio (tre grava okupo) ktp, ni do jam komencis labori por aranĝi allogan kongreson.

La laborgrupo konsistas el la estraro de la klubo kaj krome Asta S, Gertrud L kaj Karin L. Estas starigitaj grupetoj kiuj prizorgas siajn taskojn.

Kiel jam menciite ni planas fari jubilean historikon. Pro tio ni bezonas fotojn - prefere nigra-blankajn sed ankaŭ kolorajn - de homoj kaj okazintaĵoj.

La fotoj devas esti tre klaraj kaj kun ne tro da homoj kaj aĵoj. Kunportu al la klubo aŭ sendu al Karin Lindquist Sergels väg 14 A, 217 57 Malmö tel. 040/980120


Malmö Esperantoförening
*Kronetorpsg 94, SE - 212 27 MALMÖ*
☏ 040-18 71 90
Poŝtĝiro: 3 87 14 - 2

Prezidanto:
*Sten Svenonius sten@agado.net*
☏ 040-19 14 77


## Jarkunsido 9-an de marto 2005
## Tagordo

**1. Elekto de prezidanto por la jarkunsido**
**2. Aprobo de la tagordo**
**3. Ĝustigo de listo de elektantoj**
**4 Demando pri laŭstatuta anonco de la jarkunsido**
**5. Elekto de protokolkontrolanto**
**6. Jarraporto de la estraro**
**7. Raporto de la revizoroj**
**8. Demando pri malŝarĝo por la estraro**
**9 Elekto de prezidanto por la jaro 2005**
**10. Elekto de 2 estraranoj kaj 1 anstataŭanto por 2 jaroj**
**11. Elekto de 2 revizoroj kaj 2 anstataŭantoj por 1 jaro**
**12. Elekto de studkomitato kaj studsekretario**
**13. Elekto de informa komitato kaj informa sekretario**
**14. Elekto de programkomitato kaj programsekretario**
**15. Elektoj de diversaj funkciuloj**
**16. Elekto de elektoprepara komitato**
**17. Decido pri vojaĝkontribuo al la jarkunsidoj de Sveda Esperanto-Federacio kaj Eldona Societo de Esperanto por oficialaj reprezentantoj**
**18. Elekto de reprezentantoj de KEM por la supre nomitaj jarkunsidoj**
**19. Eventualaj proponoj por la jarkunsido de SEF**
**20. Diversaj raportoj**
**21. Ceteraj elektoj kaj demandoj**

**Medlemsavgiften**
**Glöm inte att betala din medlemsavgift för 2005 så du bl. a. kan erhålla medlems-tidningen PONTO.**

### Kluba raporto

8.12. **Hindio**. Iom aliaspekta kompreno pri Hindio donis al ni Annelie Nilsson rakontante pri siaj spertoj de laboro por la abc-organizo. Tiu ĉi laboras aktive por la infanoj kaj ankaŭ sin dediĉas al trejnado de la virinoj por ke ili atingu egalrajtecon en la socio. Belaj kaj interesaj bildoj akompanis la prelegon.

26.01. **Sudafrika vojaĝo**. Pere de diabildoj kaj filmo Per-Olov Johansson rakontis pri 17-taga vojaĝo en Sudafriko.
Ni aŭskultantoj vere ĝuis la naturon, la multajn sovaĝajn bestojn kaj ankaŭ la grandiozan panoramon.



Dum la vizito en Krüger Park ili konatiĝis kun la ”kvin grandaj” – leono, leopardo, elefanto, rinocero kaj bubalo. Tre interesan viziton la grupo faris al Robben Island, kie Nelson Mandela ekzilis dum 27 jaroj.

9.02. **Viva Gazeto.** Gertrud rakontis pri Lars Dufwa loĝinta en Marklunda antaŭ 200 jaroj, Gulli pri vivo en Malmö dum sia infaneco, Kjell legis, el la libro de Kolker, artikolon en kiu Zamenhof rakontis pri sia cerbumo krei esperanton.
Per-Olov rakontis pri filmo de Vittula, kaj Gerd cerbumigis niajn cerbon en konkurso kaj Åke rakontis historion pri policestro.


## Unu-taga paroliga kurso

Dum la SEA-kunsido pasintaŭtune oni decidis aranĝi tuttagan paroligan kurson.
Ni ekzercu nin paroli esperanton! Estas bone, speciale nun antaŭ la jubilea kongreso venontjare. Ann-Louise Åkerlund pretas gvidi la kurson en Malmö. Sabate aŭ dimanĉe ne gravas por ŝi, sed prefere en marto.
Estas bonŝance por ni kiuj aranĝos la kongreson, sed kompreneble ĝi estas malferma por ĉiuj.

**Konversacia kurso** okazas ĉiu-lunde inter 15.00-16.30. Ĉiuj estas bonvenaj al la kurso.

# Kontaktilo





## Klubo Esperantista de Helsingborgo

**Karaj legantoj,**

La 2005-a jaro jam aĝas du monatojn. La merkreda studgrupo bone funkcias; aliĝis nova/malnova membro al la rondo ĉirkaŭ la kuireja tablo de Barbro. Ni havas planojn kolekti materialon, traduki ĝin kaj inviti vin al **ekskurso al Sofiero dimanĉon** la 12-an de junio. Do, bonvolu noti en viaj kalendaroj la daton, por ke vi ne maltrafu la okazon. Pliaj informoj en la venonta numero.

Intertempe ni havos(is) nian jarkunvenon la 20-an de februaro kaj ordinarajn klubkunvenojn la 20-an de marto, 17-an de aprilo kaj la 29-an de majo. La majan kunvenon ni devos prokrasti unu semajnon pro la SEF-kongreso 20-22/5.

Kiel mi skribis en la lasta numero de Ponto, ni verŝajne kunvenos en la ĝardeno de iu el niaj membroj. Je tiu tempo ja devas esti bona vetero.

Du-tri klubmembroj volas partopreni komencantan kurson. Ni serĉas pliajn partoprenantojn, ĉar komenci per tiom malgranda grupo estas malstabila entrepreno. Esperanto troviĝas en la katalogo de studobjektoj ĉe ABF, sed neniu interesato anoncis sin. Dum la aranĝo ”Midvinterljus” la 12-an de februaro ni havos la eblecon elmeti materialon en la tri informejoj de la studorganizoj. Ni pretigis broŝurojn kaj afiŝetojn, plejparte prenitajn el Trycksakslagret de www.esperanto.se.



Okaze de la Semajno de Internacia Amikeco 21 ĝis 27 februaro ni sendis artikoleton al Helsingborgs Dagblad kaj al la senpaga Lokaltidningen, kiu estas disdonita al ĉiuj familioj en la komunumo de Helsingborg.

Nia unua dimanĉa renkontiĝo la 23-an de januaro estis plankunsido. Ni vokis ĉiujn membrojn veni por diskuti la estontecon de la klubo. Finfine venis nur la kvin kutimaj partoprenantoj. Tamen, krom la ekskurso al Sofiero, alia ideo estis prezentita kaj ni jam komencis prilabori ĝin. Temas pri serio da mallongaj prelegoj en la sveda fare de esperantistaj verkistoj, tradukistoj aŭ/kaj eldonistoj, kiuj dum 20-45 minutoj rakontu pri sia agado. La proksimume unu-hora programo inkluzivu muzikon, kantojn en Esperanto. La ĉefa biblioteko (Stadsbiblioteket/Växthuset) volonte akceptas tiajn programojn en Café Birger dum sabataj posttagmezoj. ABF pretas kunlabori en la aranĝado.

Se vi havas ideojn pri taŭgaj prelegantoj kaj muzikistoj/kantistoj, ni danke akceptas viajn proponojn. Anna-Maria Lange jam anoncis sin preta rakonti pri siaj kontaktoj kun Mikael Niemi. Tian temon certe povus interesi la ”ordinaran publikon”. Ĝis revido, inter alie dum la SEA-kunveno en Lund la 12-an de marto.

**Ann-Louise**

## La Esperanto klubo de Lund

## Saluton LEK-anoj!

Unua monata kunveno okazis 13/1. Estrarkunvenon ni havis 25/1. Estis decidite ne ŝanĝi la jarkotizojn, aboni Hirundo, Literatura Foiro kaj Monato, elsendi leteron al ĉiu kun validaj membrokotizoj, datoj kaj programindikoj (vidu ankaŭ la kalendaron en Ponto en agado.net), krome invito al nia jarkunsido.

Ankoraŭ du ĉapitroj en nia kompilaĵo pri svedaj kaj afrikaj famuloj pretas, nome ”Renkontiĝoj kun onta prezidanto (Ulla Saether) kaj ”Elieshi Lema – verkisto kaj sola ina eldonisto en Tanzanio” (A-M Lange).

La 5-an de dec.-04 kolektiĝis en la ejo de SENSUS gajaj festantoj (21 personoj partoprenis).
Novaĵo estis ke ni komencis per jula telero. Ulla Saether legis rakonton el sia infanaĝo, same Ulla Ström. Ebba kaj My el Osby flutis kaj pianludis – sole kaj kune – kaj John Ideland surpiane akompanis komunan kantadon de julkantoj. Memkompreneble ne mankis la de Ulla gvidita aŭkcio. Venis gastoj el Malmö kaj Helsingborg. Ingegerd kaj John fotis kaj Allan filmis. Tre koran dankon al ĉiuj kontribuantoj al tiu agrabla festeto.

Laste: Tro frue, Ingrid Engkvist, plurjara membro de LEK, forpasis la 19an de januaro. Kune kun la edzo Harry kelkaj klubmembroj ĉeestis la funebran solenaĵon.
Ripozu Ingrid en paco.



Kun salutoj
**Anna-Maria Lange**

PONTO
N-ro 1 2005

| | | |
|---|---|---|
| Dimanĉe 20.02 | KEH, Helsingborg | JARKUNVENO |
| Merkrede 23.02 | KEM, Malmö | Libroaŭkcio –bokauktion |
| Lunde 28.02 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj kaj studgrupoj |
| Merkrede 02.03 | KEKG, Kopenhago | ”*La ciganaj lingvo kaj kulturo”.* Prelego de Stanislaw Mielzarek |
| Lunde 07.03 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj kaj kantvespero |
| Merkrede 09.03 | KEM, Malmö | JARKUNSIDO - årsmöte. Tagordo sur paĝo 2 |
| Jaŭde 10.03 | LEK. Lund | JARKUNVENO |
| Lunde 14.03 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj kaj studgrupoj |
| Dimanĉe 20.03 | KEH, Helsingborg | La studrondo kunvenos |
| Lunde, 21.03 | KEK/DEFA, Kph | Jan rakontos pri vizito en Svalbard, la plej norda Norvegio |
| Merkrede 23.03 | KEM, Malmö | UEA en la hodiaŭa mondo. Prelego de ĝen.sekr. Ulla Luin |
| Lunde 28-03 | KEK/DEFA, Kph | Pro pasko neniu kunveno |
| Merkrede 30.03 | KEKG, Kopenhago | ”Prezentoj pri KEKG kaj ĝia Esperanto-laboro”<br>Okazos ĝeneralkunveno de KEKG de la 18.00 ĝis 19.15 h |
| Lunde 04.04 | KEK/DEFA, Kph | Kim Henriksen prelegos:<br>Esperanto-muziko dum la lastpasintaj 15 jaroj |
| Merkrede 06.04 | KEM, Malmö | Gramatikaj ekzercoj: Transitivaj kaj netransitivaj verboj. Anna-Maria Lange gvidos nin |
| Lunde 11.04 | KEK/DEFA, Kph | Pri la ĵus okazinta (9.4-10.4) Dana Jarkunveno |
| Jaŭde 14.04 | LEK, Lund | Kalle Kniivilä kaj Daniel Granello parolos pri Bjelorusio |
| Sabate 16.04 | KEM, Malmö | Printempa festo - vårfest - *”La Nilo, piramidoj, temploj…”*<br>Bv vidi apartan programfolion. Ĉiuj estas kore bonvenaj |
| Dimanĉe 17.04 | KEH, Helsingborg | La studrondo kunvenas |
| Lunde 18.04 | KEK/DEFA, Kph | Rakontu pri vojaĝtravivaĵo kaj montru kelkajn fotojn |
| Lunde 25.04 | KEK/DEFA, Kph | Taskoj kaj enigmoj |
| Dimanĉe 29.04 | KEH, Helsingborg | La studrondo kunvenas |
| Lunde 02.05 | KEK/DEFA. Kph | H.C. Andersen - la laboroj en la klubo rilate al la naskiĝtago. Birthe Trærup kontribuos |
| Lunde 12.05 | LEK, Lund | Naskiĝtago - de Ulla! Videofilmo pri kristnaska festo |

# Informoj pri esperantokluboj kaj grupoj de SEA

**Klubo Esperantista de Malmö, K.E.M.**
La kunvenoj komenciĝas je la 18.30 h
en Kronetorpsgatan 94, 212 27 Malmö
Kontaktpersonoj: sten@agado.net
aŭ karin@agado.net
Karin Lindquist,
Sergels väg 14 A, 217 57 Malmö,
tel. 040-98 01 20

**La Esperanto Klubo de Lund, L.E.K.**
Niaj monataj kunvenoj okazos ĉiun duan jaŭdon en monatoj sept.-majo je la 18.30-a h. en la ejo de nia studorganizo SENSUS, Krafts torg 12 A.
Kontaktpersonoj: Anna-Maria Lange,
Bredgatan 27, 222 21 Lund, tel. 046-147309
aŭ rete: Allan Ljungstedt,
allan.ljungstedt@telia.com

**Klubo Esperantista de Helsingborg, K.E.H.**
La kunvenoj okazos je la 14-a horo en Faktorsgatan 5.
Bonvolu informiĝi ĉe Ann-Louise Åkerlund tel. 042-291262 aŭ 042-186639 (oficejo) aŭ ĉe Barbro Haraldsson tel. 042-121471

**Konversacia Esperantista Klubo Kopenhago, K.E.K.**
Kunvenas en la ejo de DEFA. Vidu la informojn tie. Prezidanto: Jytte.Sunekaer@mail.tele.dk
tel. 0045-44 48 47 26

**Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo, KEKG**
Aranĝoj en Medborgerhuset, Danasvej 30 B, atingebla per buslinio 29 el stacio Vesterport, salono n-ro 1, dua etaĝo.
Pordoj malfermitaj 19.00-23.00. Ĉiu prelego okazos ĉ. 19.30 – 20.30.
Se vi deziras detalojn pri la prelegoj aŭ havas demandojn pri la aranĝoj bonvolu turni vin al Torben Svendsen, Vanløse Alle 57,
DK-2720 Vanløse. Tel. 0045-38 74 97 64
Persone al la kontaktulo de KEKG:
Torben Svendsen: esperanto@webspeed.dk
Al la asocio - KEKG: kulturgrupo@webspeed

**Fervojista klubo en Kopenhago, DEFA**
Kunvenas lundojn inter 19.30-22.00 en Banedanmark, entreprise, Vasbygade 10.
Por eniri: uzu la sonorilon ĉe la (krd)pordo.
Kontaktulo: Lene Niemann,
tel. 0045-49 26 13 19
Rete: niemann@mail.dk
Kluba retadreso: defakek@hotmail.com

## *Hejmpaĝo de SEA www.agado.net*

**Denove esperanto en nuntempa literaturaĵo**

Ĉu vi legis la libron LA ALĤEMISTO (Alkemisten, 2002) de la brazila verkisto Paulo Coelho?
Bone, tiakaze vi ne solas – ĝi estas tradukita al 56 lingvoj kaj eldonita en 156 landoj, kun pli ol 30 milionoj da ekzempleroj venditaj. Mi atentigis pri la mencio de esperanto Ann-Marie Sandelin, Gotenburgo. La de ŝi substrekitajn frazojn mi tradukis.

P. 74 – Lia tuta vivo kaj ĉiuj liaj studoj celis al trovo de la sola vera lingvo de l´ universo. Unue li interesiĝis pri esperanto, poste pri la diversaj mondreligioj kaj fine pri alĥemio. Esperanton li parolis…

Ni saltos al p.ĝ 102 …li subite komprenis la plej gravan parton de la universala lingvo, kaj kion ĉiuj homoj surtere povis kompreni en siaj koroj. Tio estis la amo, io pli aĝa ol la homaro, pli aĝa ol la dezerto mem, sed kiu tamen reviviĝas same forte ĉiufoje kiam du okulparoj renkontiĝas.

Sampaĝe – Tiu ĉi estis la vera universala lingvo. –

Fine, p. 103 ...homoj kiuj tiel diris eble neniam lernis la universalan lingvon. Ĉar kiam oni fine enpenetras en tiun lingvon oni komprenas, ke ĉiam troviĝas persono en la mondo kiu atendas, povas esti meze de dezerto aŭ meze de grandurbo.

Do, ni ja havas belan konkuranton, ĉu ne? Eble iu aliloke jam atentigis la esperantistan legantaron pri la supre dirita – respondu!

Anna-Maria Lange